

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Japanoj nomas tiun ĉi jaron “la unua jaro de Reiwa”

Sibayama Zyun'iti

La kuranta jaro estas la jaro 2019 post Kristo, eĉ ne por kristanoj. Nu por japanoj, tiu ĉi jaro ĝis la 30a de aprilo estis la 31-a jaro de Heisei [平成 pron. hejsej], kaj de la 1-a de majo, la 1-a jaro de Reiwa [令和 pron. rejŭa], paralele de la uzo de 2019. Tiu alternado okazis samtempe kun la alterno de la japana imperiestro, japannome tennoo, de Akihito (1933-) al Naruhito (1960-). Kial kaj kiel tio okazis?

historia perspektivo

La sistemo de la “erao-nomo laŭ imperiestra alternado” havas originon en antikva Ĉinio, konata de la jaro 140 antaŭ Kristo. Unu imperiestro rajtis ŝanĝi erao-nomon dum sia regado, kaj la altroniĝo de la sekva imperiestro (ĉu herede, ĉu milite) estis nepra por ŝanĝo en plej oftaj okazoj. La sistemo disvastiĝis al orient-aziaj dinastioj, sed nun nur la japana regno konservas la sistemon.

En Japanio, la Imperiestro Kootoku (la 36-a japana imperiestro, laŭ formala historio) uzigis la unuan erao-nomon Taika, en la jaro 645 post Kristo. En la japana historio, imperiestro tenadis simbolan potencon, kun la rajto nomi erao-nomon.

En 1868, tiama imperiestro rehavis ne nur simbolan, sed efektivan potencon al si, depreninte potencon de tiama ŝoguno, kaj samtempe alprenigis la erao-nomon Meiji [明治 pron. mejĝi], deklarante ke unu imperiestro uzados unu erao-nomon. La erao daŭris ĝis 1912. Poste sekvis Taisho [大正 pron. tajŝoo] ĝis 1926, kaj Showa [昭和 pron. ŝooŭa] ĝis 1989.

En la tempo de Showa, Japanio estis venkita de la aliancaj landoj ĉekape de Usono, kaj neita estis la imperiestra regado. Naskiĝis la demokrata regno Japanio kun nova konstitucio, en kiu imperiestro fariĝis la simbolo de la regno. Tiutempe, eĉ la okupantoj de Japanio ne igis aboli imperiestrecon. Tial Showa finiĝis kun la forpaso de tiama imperiestro Hirohito, kaj sekvis Akihito.

ĝis la alveno de Reiwa

Ĉar la imperiestro Akihito intencis mem retiriĝi ne atendante sian forpason, la registaro difinis, ke la 1-a de majo 2019 estu la komenca tago de la nova imperiestro Naruhito, kaj sekve de la nova erao-nomo. Hodiaŭ, multaj oficialaj dokumentoj komputigitaj uzas la japanajn erao-nomojn, devas esti tempo por konverti la daton kun la nova nomo. La 1-a de aprilo 2019 estis tiel fiksita por la tago de proklamo (tamen restas sistemoj ne povantaj alĝustigi la erao-nomon). La registaro sekrete komisiis al pluraj erudiciuloj elpensi kandidatojn, kaj en la 1-a de aprilo, aŭskultis opiniojn de aliaj erudiciuloj, fine konsiliĝis en la kabineto, kaj je la 11a kaj 41 minutoj, oni proklamis la erao-nomon Reiwa [令和]. Laŭ la registaro ĝi signifas “belan harmonion”. La ĉina ideogramo Rei [令] estas, en la kutima senco “ordono”, sed ĉi tie estas kun klasika senco. La ideogramo Wa [和] samas kun tiu de Showa. La ideogramoj estis elektitaj de la utaro Manjoo, la plej klasika literaturaĵo japana, laŭ la klarigo de la registaro.

Raporto

Aŭstralia 3ZZZ en februaro – aprilo 2019

<<< elsendoj >>>

La esperantlingva elsendo de 3ZZZ el Aŭstralio (aŭskultebla de melburno.org.au/3ZZZradio/) fojfoje prenas artikolon el nia “Novaĵoj Tamtamas” (NT). En ĉi tiu jaro ĝis nun estis jenaj elsendoj.

4-a de feb.: Akiya Hideo, “Ceramikaj Artoj de Portugalio” (NT, dec. 2018)

1-a de apr.: Namba Fumiharu, “Konceptoj maldekstra/dekstra” (NT, mar. 2019)

--- pri tio legu suban artikolon.

22-a de apr.: Sibayama Zyun'iti, “Ĉu kazino en Jokohamo?” (NT, mar. 2019)

--- pri tiu ĉi legado ne aperis en la menciita retpaĝo. Post “Legado: Laszlo”, sed antaŭ “Kanto por infanoj” ja estas, nome de la 38-a minuto.

<<< komentoj >>>

Jen estas la komentoj de la radi-parolantoj de 3ZZZ pri “Konceptoj maldekstra/dekstra”, kiu ne estis bone aŭskultebla pro bruo en la

elsendo.

La leginto, Franciska Toubale komentis: “Kiam mi komencis lerni Esperanton, pro tio ke mia vortprovizo estis malgranda, mi same devis trovi kiel esprimi min kaj devis profunde pensi: kion ekzakte signifas tiu vorto. Estis la sama mensekzerco.”

Kaj laŭ ŝi, la kolego Marcel ne bone sekvis la tuton kaj diris ke hodiaŭ ne estas granda diferenco inter dekstra kaj maldekstra ĉar li tuj pensis pri la politikaj partioj.

Cetere, Franciska komentis ĝenerale pri nia gazeto NT jene:

“Dankon pro regula sendado de Novaĵoj Tamtamas. Mi ĝojas ke vi ne kopias artikolojn de aliaj revuoj retaj aŭ paperaj. Tio estas la problemo nuntempe: la sama artikolo reaperas en multaj lokoj. Amikajn salutojn, Franciska”

Dankon al Franciska kaj Marcel, de Sibayama, la Redaktoro de NT.

Okazis

([KK]=nia kutima kunveno, nome Kanagawa-Kenmin-Senta, proksime de la Stacidomo Jokohama)

***apr. 20 [KK] Hama-Ronda Vespero**

Estis 2 paroloj japanlingvaj, kaj ĉeestis 16. (1) S-ro Suzuki Keiichiro, nia membro kaj la Prezidanto de Japana Esperanto-Instituto (JEI), parolis pri la 100-jara historio de JEI, fondita en 1919. (2) S-ro Doi Hirokaz parolis pri la plano fondi Esperanto-Muzeon en nia urbo Jokohamo, kies modelo estas Esperanto-Muzeo en Svitavy, Ĉeĥio. Sed kial tia plano? Tio dankas al la lastatempa ofermono al nia rondo, de anonimulo.



en la ĉeĥa Esperanto-Muzeo

Eseoj

Vizitis la Tombejon de la Militviktimoj de Brita Konfederacio

Tanigaŭa Hiroŝi

La 3an de aprilo mi kun mia edzino vizitis la unuan fojon la titolitan Tombejon. S-ino Imai Saĉiko, nia samrondanino, gvidis nin. La Tombejo situas ĉirkaŭ 6 km sudokcidenten de la stacio Jokohamo. Ĉirkaŭite de kvieta, verdoriĉa arbaro ĝi trankvile vastiĝis. (8 hektaroj)

Forte min impresis unue la grandnombro de la tomboŝtonoj bonorde vicigitaj sur la belprizorgita vasta gazono. La tombejo estas dividitaj en 4 areoj; la brita (la plej granda: la foto), la aŭstralia, la kanadanozelandaj kaj la hinda-pakistana. Estas entute 1555 tomboŝtonoj de la militviktimoj mortintaj en Japanio dum la Dua Mondmilito. Estis ankaŭ domocindrometejo kie estis metitaj la kunigitaj cindroj de 335 viktimoj. Kial tiom multe da ili!? malgraŭ, ke dum la Milito okazis enlande de Japanio nenia surtera batalo kia tiom multe da alilandaj armeoj militkaptiĝis. Alie estis “Postmilita Areeto” kie estis 171 tomboŝtonoj de la aliancarmeanoj mortintaj en Japanio post la Dua Mondmilito.

En la komenco de la Dua Mondmilito la japana armeo venkadis. Militkaptitoj nombris ĉirkaŭ 200 mil lokaj kaj 150 mil uson-eŭropaj. Depost februaro 1942 japana armeo ekvenkita decidis sendi uson-eŭropajn militkaptitojn al Japanio. Ĉirkaŭ 32 mil estis transportitaj al Japanio kaj laborigitaj en militaj fabrikoj, minejoj k.a. Iliaj laborkondiĉoj estis senkompatemaj mizeregaj. Ĝis la fino de la militfino multaj el ili mortis. Brit-konfederaciaj armeoj kutimis entombigi militviktimojn ĉeloke. Komisiono de Brit-Konfederacia Milittombejo (KBKM) decidis konstrui la milittombejon en Jokohamo. Japana registaro proponis terenon senpage. Tiele KBKM konstruis la Tombejon ĉi tie kaj ĝin administras. Ĉiujare en la

11a de nov. funebra ceremonio okazas kaj ĉiuj brit-konfederaciaj ambasadoroj ĉeestas.

“Alia specifa funebra ceremonio okazas”, s-ino Imai klarigis:

Tio okazas ĉiujare en la unua sabato de aŭgusto. Ĝin iniciatis Nagase Takaŝi kiu militservis dum la Dua Mondmilito kiel armea interpretisto. Lia trupo konstruis la fervojon de Tajlando ĝis Birmo (nuna Mjanmaro). “La Fervojponto de Rivero Kvai” estas konata. Nagase detale sciis; kiel la japana armeo kruelege pritraktis la militkaptitojn: kiel multaj britaj militkaptitoj mortis mizerege. Post la Milito li ofte frekventis Tajlandon por pentooferi kaj kondolenci la animojn de la viktimoj. Saman kompaton kaj pentooferemon li sentis ĉi tie.

“Bonvolu partopreni iam en la unua sabato de aŭgusto en la kondolenca ceremonio ĉe ĉi tiu Tombejo”, diris s-ino Imai.



Karaj legantoj, la Redakcio prezentas ne publikigitan eseon de bedaŭrata s-ro Koyama Takesi (1933-2018). La 16-an de junio ni havos lian unuan mortodevenan tagon. Por rememori lin, ni aperigas/-os kelkajn verkojn, kiujn li prezentis en la lernoklaso "Jokohama Salono" de nia rondo.

Atombombo kaj kruda rizo^{*1}

KOYAMA Takesi

Lastatempe mi legis la libron de Akizuki Tacuiĉiroo^{*2}, atombombita kuracisto en Nagasako. Ĝi estis tre interesa kaj valora por mi, ĉar ĝi havis tre mizeregan fakton de atombombitoj kaj bonan sugeston.

En la 9-a de aŭgusto 1945, je la 11-a kaj 2 minutoj antaŭtagmeze, usona bomb-aviadilo deĵetis atombombon sur la kvartalon Urakami en Nagasako. Ĉiuj konstruaĵoj en Urakami estis komplete detruitaj kaj multe da loĝantoj estis mortigitaj kaj vunditaj.

La ĉefkuracisto Akizuki tiam kuracadis malsanulon en la Hospitalo Urakami-Daiĉi, 1,8 kilometrojn for de la eksplodocentro de la atombombo. La hospitalo estis tute detruita, sed feliĉe 70 personoj en la hospitalo, nome kuracistoj, flegistinoj, laboristoj kaj enhospitaligitaj, ne ricevis gravan damaĝon. Tial ili tuj plenumis sian taskon por multaj vunditoj. De post kelkaj tagoj multaj loĝantoj estis atakitaj de atommalsano kaj mortis suferigite. Sed la personoj koncernaj al la hospitalo ne mortis eĉ unu. Tio estis tre mirakla kaj mirinda.

Kial ili povis eviti la atommalsanon, kvankam ili vivis en la damaĝita distrikto? La ĉefkuracisto Akizuki decide diris pri tio, ke ĉiuj hospitalaj koncernatoj ĉiutage manĝis krudan rizbulon

kun salo kaj undarian misosupon. La kruda rizo ekskreĉiis la tokson de atombombo kaj la salo malebriigis rentgenan ebriion^{*3} de radiografisto.

Poste mi eksciis, ke kruda rizo povas ellasi radioaktivecon en korpo, sed ĝi havas fortan venenon en la embrio kaj la ŝelo. Do ĝi utilas por kuraci radiomalsanon, sed oni devas atente preni ĝin same kiel medikamenton.

Ni japanoj longe devas vivi vole nevole en la lando de radioaktiva poluado pro eksplodo de nuklea centralo en Fukuŝima en 2011. Interalie la loĝantoj en Oriento-Norda regiono devas vivi longe longe sub aera poluado timante radioaktivecon ĝis la detruita nuklea centralo malaperas.

Kion ni devas fari? Ĉu ni devas atendi la specifajan medikamenton por radiomalsano? Ne, mi ne atendas ĝin. Mi, timemulo pri radiomalsano, volas provi manĝi krudan rizon kaj misosupon kun undario kaj tofuo gardante mian sanon. Ĉu mi estas stultulo? (2012-01-13)

*1 kruda rizo: Temas pri rizo kun ŝelo kaj embrio. Oni kuiras ĝin kaj manĝas. *2 originalo de la libro: 『長崎原爆記』(被爆医師の証言) 秋月辰一郎著. *3 radioaktivaj simptomoj, similaj al ebrieco

Niaj Planoj

*maj. 18 [KK] Hama-Ronda Vespero

S-ro Sasaki Teruhiro parolos pri la lastatempa situacio de Esperanto-movado en Ĉinio. Li restis kelkajn jarojn en Ĉinio, instruante kaj la japanan lingvon kaj Esperanton.

*jun. 15 [KK] Hama-Ronda Vespero

S-ino Doi Ĉieko parolos en la japana pri Hasegawa Teru (plumnomo Verda Majo, 1912-1947). Teru, estante esperantisto, edziniĝis al ĉino siatempe studinta en Japanio, kaj kun li vivante en Ĉinio agis kontraŭ la japana invado al Ĉinio.